*Julio-Aŭgusto 1955, Nro 9.*

# LA JUNA VIVO

DE "MONDA ESPER... JUNULAR-ORGANIZO"

*Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435[2]*
*Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55*
*Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro*

## DE HILVERSUM AL L'AQUILA.

### Superrigardo pri la organiza vivo de TEJO.

**Generale:**

Post la kongreso en Hilversum ni povis pri TEJO konstati nur unu fakton: ĝi vivis. La lastajn monatojn antaŭ la kongreso la organizo vere ne ekzistis; ĝi ne havis funkciantan estraron kaj ĝia organo ne aperis. La kaso estis malplena kaj la administracio nekompleta. Mankis la eblo kontakti kun eksterlando pro la mallaborado de la plimulto de la perantoj.

En la sekvanta jaro la (nekompleta) estraro provis rekonstrui la organizon kaj refunkciigi ĝian aparaton. Parte ĝi sukcesis: reaperis LJV, kvankam malregule pro manko de mono, restariĝis kontaktoj kun eksterlando. La administracio pliboniĝis kaj pri kelkaj landoj plene ordiĝis. La LOK en l'Aquila energie laboris por efektivigi la kongreson en 1955a.

Sed parte la estraro ne sukcesis: en pluraj landoj mankas aktivaj perantoj, la financoj ne estas sanaj kaj la taga estraro restis tro malgranda.

Resume ni povas diri, ke en la pasanta organiza jaro estiĝis la bazo por nova reflorado de TEJO, bazo tamen mallarĝa kaj malforta. Sen plia energiado de la TEJO-anaro la pluekzistado de nia organizo estas neebla.

**Financoj kaj organo:**

En septembro 1954a ni trovis la financojn tute ĥaosaj. Nur en- kaj elspezoj estis administritaj, mankis notoj pri bonhavoj, ŝuldoj, pagitaj kotizoj, ktp. La kaso estis malplena. Montriĝis neebla restarigi taŭgan financan superrigardon pri la pasintaj jaroj. Dank'al la akurata laborado de la nederlanda sekcio ni povis baldaŭ disponi pri enkasigita kotizo, krome ni ricevis gravan donacon el Anglio, per kiu ni povis pagi parton de la ŝuldego al la presisto. Krome ni ricevis la bonhavon en Germanio kaj kotizojn precipe el Anglio kaj Francio.

Tuj kiam mono estis en la kaso, ni reeldonis LJV-n, komence stencilita, poste presita dank'al la kun-

laboro de la presisto, kiu konsentis pri ne tuja amortizigo de nia ŝuldo. Ĉiumonatan aperigon niaj financoj ne ebligis.

**Administracio, kontakto kun eksterlando.**

En la daŭro de la jaro ni sukcesis parte reordigi la administracion, nome pri tiuj landoj, kie la perantoj akurate informis nin. El la gravaj TEJO-teritorioj nur la perantoj en Nederlando kaj Francio bone prizorgis la aferojn. F-ino Rees, Anglio, bonege informis nin, sed ni tie ĉesigis la sendadon de LJV al pli ol 100 membroj pro multjara kotizŝuldo. Pri Germanio ni ne havas klaran bildon, ĉar la peranto subite eksiĝis kaj sekve nur kelkaj regionaj perantoj aktivas. Nun ni kontaktas kun pluraj aliaj landoj, sed ĝenerale estas malfacile trovi aktivulojn pretaj labori por ni.

**Konkludo.**

En la jarkunsido en Hilversum ni havis la impreson, ke pluraj junuloj pretas entuziasme subteni nian laboron. Sed escepte de malmultaj fideluloj la granda plimulto restis inerta. Nehavante sufiĉan subtenon, la estraro povis nur parte plenumi sian taskon. Por plene certigi la refloradon de TEJO, pluraj junuloj devas esti pretaj fari seriozan laboron. En diversaj landoj ni bezonas perantojn, kiuj devas ordigi la landan administracion kaj pligrandigi la membraron en sia teritorio. Ĉar ni eksigis plurajn membrojn kaj abonantojn, kiuj ne pagis dum longa tempo - kaj relative malmultaj novuloj aliĝis, la membronombro grave malaltiĝis. La varbado de novaj membroj kaj abonantoj estu grava parto de la farota laboro, ĉiuj membroj povas ĝin efektivigi. En la Esperanto-movado multaj junuloj aktive partoprenas. Ne ekzistas dubo pri la demando, ĉu nia organizo estas ekzistipova. Tiu povo dependas ne nur de la nombro da junuloj neorganizitaj, sed ankaŭ de la nombro da membroj pretaj per reala laborforto konstrui nian organizon. Ni esperas, ke la venonta jarkunsido en l'Aquila plifortigos nian, spite de multaj seniluziiĝoj ankoraŭ vivantan optimismon.

Vivu TEJO!

R. H. Kraefft Jr., intern. prezidanto.

---

## ORGANIZAJ INFORMOJ:

**Germanujo:** La Esperanto-Junularo-Berlin elektis kiel TEJO-peranton sron Hubert Krüger, Berlin S.O. 36, Eisenbahnstr. 29. Amiko Krüger pretas akcepti la perantecon por tuta Germanujo. Ni kore dankas lin, la aferon ni pritraktos en Italujo dum la kongreso.

Bedaŭrinde la TEJO-estraro tute ne disponas pri la nomlisto de la germanujaj TEJO-anoj. Ni petas sron Brune, ke li bonvolu sendi la havaĵojn de TEJO kune kun la listoj al sro Krüger. Pri la stato aperos raporto en LJV.

**Francujo:** Tre akuratan laboron faris la nova perantino S-ino Giloteaux, nian plej koran dankon al ŝi. Bedaŭrinde ŝi ne disponas pri la malnovaj listoj, tamen ni esperas, ke ŝi baldaŭ ricevos ilin kaj ke en Francujo kun helpo de niaj diversaj geamikoj la franca grupo sukcesos fariĝi unu el la bastionoj de TEJO.

**Pariza Sekcio:** Du kursoj okazas ĉiusemajne en la sidejo de UEF. Alia kurso funkcias en la Liceo Louis-le-Grand. Kultura kunveno okazas la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato je la 21a, ĉe UEF, 34 rue de Chabrol. La nova delegito de TEJO en Parizo estas **Paul Ciliga, 17 rue Duguay-Trouin, Paris VIe.**

**Orientfranca Sekcio** de TEJO organizis Internacian Renkontiĝon dum Pasko en Junulgastejo de Phalsbourg (Moselle). Bedaŭrinde ni ĝis nun ne ricevis raporton pri ĉi renkontiĝo.

**Por reorganizi** la administradon en Francujo kaj reakiri niajn abonantojn ni petas ĉiujn francajn geamikojn, kiuj pagis sian kotizon kaj pro iu eraro ne ricevis LJV-n, ke ili tion senpere anoncu aŭ ĉe la landa perantino, aŭ al la ĉefestraro. Bonvolu samtempe indiki, kiam kaj al kiu vi pagis. Notu la nron de via kvitanco.

**Brazilio:** Estiĝis Koresponda Centro Por Tuta Mondo ĉe Sro Carlos Geiser, ĵurnalisto, Pr. Carlos Gomes, 288, CURITIBA-Brazilio. En la nova revueto PINHEIRAL (Pinarbaro) li faras propagandon por TEJO.

**Nederlando:** Malgraŭ la aktivado de la landa estraro le planita kunveno en Putten ne povis okazi pro manko de partoprenontoj.

Per akurata pagado kaj prunto de mono la nederlanda sekcio ebligis la forsendadon de LJV. Koran dankon.

---

## 5a Festivalo de la Tutmonda Demokrata Junularo

okazos de la 30a de julio ĝis la 14a de aŭgusto 1955 en Varsovio. Oni antaŭvidas partoprenon de ĉ. 50.000 gejunuloj el 60-70 landoj kaj kelkcentmil polajn gejunulojn. Verŝajne inter la eksterlandaj partoprenontoj troviĝos ankaŭ multaj esperantistoj.

Tial estas necese, ke oni petu okazigon de esperanta kunveno dum la festivalo kaj petu akcepton de Esperanto. La adreso de la Org. Komitato de la 5a Festivalo de la Tutm. Dem. Junularo estas: Warszawa, Mokotowska 3.

Informu la Asocion de Esperantistoj en la Pollando, Warszava, Marszałkowska 81/32 pri via partopreno en la Festivalo.

La Estraro de TEJO deziras al la pacbatalantoj por Esperanto grandan sukceson en ilia laboro.

---

## PARTOPRENON EN MEMVOLA-PORKAMPARA-HELPO DE LA JUNULARO.

organizas Sro Josef Steppan, ĉefinstruisto en Hüttlingen/Württ. Abstgmünderstr. 17, Germanujo en la periodo de la 1a ĝis la 21a de aŭgusto 1955 en la regiono Sonnblick (Altaj Tauern), Aŭstrujo. Ĉi jare li deziras pere de esperantistaj gestudentoj kaj gelernantoj helpi en Aŭstrujo ĉe la konstruado de almonta vojo. Sekvontjare eble en iu alia lando.

Ni volonte aŭdos post la finiĝo de la laboro, ĉu en tiu ĉi laborkampo partoprenis esperantistoj krom sro Steppan kaj ni volonte publikigos artikoleton pri iliaj spertoj.

# HISTORIO DE T.J.O.

Verkis por T.J.O. M. v. d. Horst.

## La unuaj klopodoj.




En Esperantujo daŭre estis personoj kiuj vidis la gravon de la ekokupo de la junularo pri Esperanto. Multajn provojn oni faris kaj pluraj unuopuloj laboradis.

En julio 1934 ekaperis, post zorga antaŭpreparo, La Juna Vivo, organo por la junularo. Ĝin eldonis ges-roj van Veenendaal en Nederlando, kiuj ankaŭ redaktis ĝin. Ili profesie estis geinstruistoj kaj ili spertis en la vilaĝa lernejo, ke Esperanto donas al la junularo rimedon por pli bone ekkoni la mondon kaj ĝian loĝantaron. Per L.J.V. tute redaktita en Esperanto ili deziris plilarĝigi la eblojn. Daŭre ili instigadis la legantaron al verkado por la organo kaj kiam ni foliumas en la tiamaj jarkolektoj ni vidas, ke ili plenrajte fieris pro la rezulto.

Mankis malmultekosta lernolibreto uzebla en lernejoj. S-ino van Veenendaal verkis la internacian lernolibreton La Juna Vivo. Nuntempe ĝi ankoraŭ estas uzata, kvankam aperis poste pli bonaj sed ĝenerale multekostaj lernolibretoj internaciaj. La unua eldono estis sekvata de dua eldono por kiu Floor Meydam faris pli modernajn belaspektajn desegnajojn. Jam sekvis tria eldono.

Internacia Kantaro La Juna Vivo aperis kun aldono de muziko por ĉiu kanto.

Kiel klimakson ges-roj van Veenendaal proponis okazigi Internacian Junular-Kunvenon en Groet, Ned. Entuziasme la propono estis akceptata. Ges-roj van Veenendaal helpataj de s-ro Bant, lernejestro en Groet, laboregis por la kunveno kaj en aŭgusto 1938 kunvenis en Groet ducent gejunuloj el dek diversaj landoj. La priskribo de tiu festo estas malfacila. Kion ni tie sentis kaj spertis multe superis niajn atendojn.

Dum la granda festvespero i.a. parolis la ĉeĥa esperanto-pioniro Prof. Julius Glück. Li diris, ke ĉi tiu kunveno estas la tria elstara punkto en la Esperanto-Historio. La unua estas la publikigo de la lingvo fare de Dr. Zamenhof; la dua estas la unua Universala Esperanto-Kongreso en Bulonjo; kaj la tria estas la unua Internacia Junular-Kunveno en Groet.

S-ro Schut faris de la kunveno moviĝantan filmon. Li filmis la prezentatajn popoldancojn kaj teatraĵetojn kaj li filmis nin dum ludoj, promenoj kaj ekskursoj.

Ĉeestis lernejaj klasoj el Anglujo, Francujo kaj Nederlando kaj unuopaj partoprenantoj el pluraj landoj, eĉ unu, Pat Morrison, el Aŭstralio.

Je unu el la lastaj tagoj s-ino van Veenendaal kunvokis la gvidantaron kaj plej aĝajn gejunulojn al kunveno. Tie ŝi deklaris: Nia provo eldonante L.J.V. plene sukcesis; nia provo por ĉi tiu kunveno same. Nun estas la tempo, ke ĉi ĉio ekhavu konkretan formon kaj por ebligi, ke

la komencita laboro estu daŭrigata ni starigu junularan organizon. Kun entuziasmo oni akceptis la proponon unuanime. Dum tiu kunveno oni fiksis la provizorajn gvidliniojn kaj elektis estraron.

## Tutmonda Junular-Organizo.

Jen la organizo kun nur eta nombro da anoj kaj freŝbakita estraro. Por bremsi la tro laboremajn junajn estraranojn, s-ino van Veenendaal donis al ni onklon Pit kiel prezidanton. Tiun bremson ni feliĉe neniam sentis. Energie ni eklaboris. La sekretario laboregis. La filmservo havigis kopion de la Groet-filmo al Anglujo kaj du tiaj cirkuladis en Nederlando. La propagandservo per daŭre novaj planoj diskonigis T.J.O. La landaj ĉefperantoj eklaboris. La kasisto cerbumis kiamaniere ekhavi la monon por pagi ĉi ĉion, ĉar nur per cendoj la mono envenis. Sed la ĝenerala optimismo de la juneco ne vidigis al ni la materian mizeron. Nur dank' al la idealismo ni povis daŭrigi.

Ni planis la duan Internacian Junular-Kunvenon 1939 en Tervuren, Belgujo. Kia laborplena tempo! Tervuren baldaŭ estis fakto kaj ne malpli brila ol Groet kun ankoraŭ pli da partoprenantoj. La belgra radio dissendis parton de la kunveno kaj intervjuis la T.J.O.-prezidanton. Ree estis ok festotagoj kun dumtagaj ekskursoj kaj vesperaj festoj. Ree ni vidis multajn larmojn ĉe la adiaŭo.

Sed ni ankaŭ havis laborkunsilon. Kaj en ĝi ni traktis la internajn aferojn. La celon ni konkrete formulis jene: havigi al la junularo indan vivocelon, nome interfratigi la homaron.

La filmservo ree faris belegan filmon, kiu kiel dokumento de nia laboro altvaloras.

Kun pli da energio ni reiris hejmen kun la firma intenco labori ankoraŭ pli bone kaj revidi unu la alian en 1940 en Anglujo, kie ni planis la venontan Int. Jun. Kunvenon.

Ni malatentis la ĝeneralan sintenon en la Esperanto-Movado, kie oni iom bonvole rigardis T.J.O.n, sed neniel helpis al ni. Ni ne bezonis helpon, laŭ nia kredo, kaj memstare per propraj fortoj, kiaj junuloj ja estas, ni esperis kaj deziris fari nian taskon.

Preme alvenis la militdanĝero! La kontakto kun pluraj anoj fariĝis necerta. En Septembro 1939 la milito en sia plej kruela formo estis fakto. Ni decidis daŭrigi kaj ankoraŭ tenis la esperon dum 1940 okazigi la trian I.J.K.

Majo 1940! Nederlando, Belgujo kaj Francujo milittereno post submetiĝo de kelkaj aliaj landoj. Ni decidis daŭrigi. Malgraŭ la okupado de Nederlando la estraro havis seninterrompan kontakton kun pluraj landoj, eĉ kun Anglujo ĝis 1941. Por tio ni havis la helpon de nia portugala peranto, kiu peradis la leterojn. En la somero de 1940 la ned. TJO-sekcio okazigis landan semajnfinon en Bakkum. Plene ĝi sukcesis. La Juna Vivo regule aperis.

Marto 1941! Funebra dato. Nuligo en Nederlando de ĉiuj Esp. organizoj, konfiskado de ĝiaj havaĵoj, malpermeso de Esperanto. Ankaŭ la TJO-estraranoj dum tiu fatala dato devis submetiĝi al hejmtraserĉo kaj konfiskado de la posedaĵoj. Ĉe la sekretario, kasisto kaj propagandservo oni konfiskis ĉion. La filmservo devis malhavi la filmojn, la Libro-Ser-

vo la librostokon. Ĉio forportita kaj ĉiuj niaj laboroj severe malpermesataj. Eĉ niajn insignojn ni devis malhavi.

Malgraŭ la malpermeso la kontakto restis kaj en la somero de 1941 la ned. TJO-anoj semajnfinis en Putten, la vilaĝo kiu poste tiom kruele estis traktata. Kelkajn tagojn poste unu el la estraranoj devis veni antaŭ iu aŭtoritato kaj oni severe malpermesis kaŝitan labordaŭrigon: Kiam ree estus konstatata TJO-kunveno, la tuta estraro estus kondukata al Germanujo. Tiam nur restis la persona kontakto, kiu restis dum la tuta milita tempo.

Kelkfoje ni kredis al baldaŭa fino, ree kolektis adresojn kaj kompilis cirkulerojn, sed vane.

Finfine en la printempo de 1945 ni ne povis erari.

## La Postmilita T.J.O.

En la lastaj tagoj antaŭ la por ni efektiva militfino jam okazis estraranaj interparoloj kaj tuj kiam la okupanto devis foriri ni eklaboris. Sed mankis mono, mankis materialo.

Subite la filmoj ree estis ĉe la filmservo. Iu amika policano savis ilin kaj bone konservis ilin por ni. La sekretario rericevis la konfiskitajn aĵojn kiujn la loka polico tiom bone prizorgis, ke detruo de tio ne eblis, kaj eĉ nia librostoko reaperis. Dank' al tio ĉio ni ree havis materian komencon. Sed mankis elektro por montri la filmojn, papero por cirkuleroj kaj por La Juna Vivo kaj ĉefe mankis mono.

En aŭgusto 1945 ni povis okazigi la unuan kunvenon en Nederlando, en Koedijk. Detale la estraro traktis kun la anaro la irotajn vojojn kaj poste ni reĝuis Groet kaj Tervuren revidante la filmojn.

Aŭtune 1945 ni modeste reaperigis „La Juna Vivo" kaj ni ricevis ĝojesprimojn el la tuta mondo. La angla TJO-sekcio staris firme kaj en Belgujo kaj Francujo oni rapidis rekonstrui ĝin. Tamen la milito malfaciligis multon, kio antaŭe facile eblis.

En aŭgusto 1946 okazis en Blankenberge, Belgujo, TJO-konferenco al kiu partoprenis reprezentantoj el Anglujo, Belgujo, Francujo, Nederlando kaj Svedujo. Detale oni tie traktis la diversajn proponojn kaj la proponitan regularon. Per referendumo ni decidigis la anaron dum la vintro 1946-'47.

Unu el la proponoj rilatis la aliĝon de T.J.O. kiel faka organizo al I.E.L. Tiu propono aperis pro la sinteno de kelkaj landaj Esperanto-Asocioj, kiuj rifuzis rekonon kaj helpon al ni kiam TJ.O. rifuzas deklari sin parto de la Esperanto-Movado per aliĝo al I.E.L. La propono estas akceptita, kvankam kelkaj anoj preferis U.E.A. aŭ SAT Tiun lastan ni ne povis akcepti ĉar T.J.O. nepre ne povas sin ligi kiel junularorganizo al ne supertendenca asocio. La junularo lernu la mondon kaj ĝian loĝantaron koni objektive kaj je maturiĝo ili se necese elektu doktrinon aŭ ideologion laŭvole. En TJO ni konas ĉiutendencajn gejunulojn, kiuj en kaj dum siaj gejunulaj okupoj ne bezonas ion alian ol tion kio povas havi la intereson de ili ĉiuj. Post ensendo de nia peto pri allaso ni devis atendi ĝis venonta estrarkunveno. En aŭgusto 1947 ni ricevis la informon, ke la intertempe kunfandiĝintaj U.E.A. kaj I.E.L. sub la nomo Universala Esperanto-Asocio akcep-

tis T.J.O. kiel fakan organizon. Ambaŭ organizoj subskribis la kontrakton kaj T.J.O. serioze deziras plenumi la akceptitajn devojn de ĝi

Per tio T.J.O. do estas parto de la organizita Esperanto-Movado. Nun, unu jaron poste, ni ne povas diri, ke la Esperanto-Movado multe ŝanĝis sian sintenon. Ĝenerale oni bonvole rigardas T.J.O. kaj pretas de tempo al tempo presigi novaĵojn pri T.J.O. en la organoj, sed intencan kaj entuziasman helpon ni ĝis nun ne povis konstati.

Kion oni fakte atendas de T.J.O.? Kiam ni komparas nian Tutmondan Familion, pri kiu ni ĉiam tiom fieras kaj eĉ kantas, kun ordinara familio, ni konstatas, ke oni atendas de T.J.O. profiton por si mem. Kontraŭe en ordinara familio. En ĝi la pliaĝaj familianoj laŭ kutimo, moro kaj propra konvinko akceptas la devon kontribui al la edukado kaj flegado de la pli junaj familianoj.

Aŭgusto 1947. Ipswich akceptas la trian Internacian Junular-Kunvenon. Kia festo! Niaj anglaj geamikoj faris ion grandiozan. La jam por 1940 planita Kunveno do finfine estis fakto. T.J.O. refreŝigita staras firme post la malluma periodo.

Dum la laborkunsido en Ipswich ni traktis la estraran agadon, kiun oni plene subskribis, kaj la diversajn proponojn. Unu el la proponoj estis por amika kunlaborado kun la organizo Denaska Esperantistaro. Ĝia fondinto kaj prezidanto s-ro Robert Robertson, 86 jara veterano el London, persone ĉeestis kaj varme defendis la proponon. Unuanime oni akceptis la proponon kaj permesis al la estraro daŭrigi la intertraktadon por estonta kunfandiĝo de ambaŭ organizoj, laŭ la deziro de Denaska Esperantistaro.

Krome la kunveno petis s-inon van Veenendaal akcepti la titolon de honora prezidantino, kion ŝi akceptis. La propono pri intima kunlaborado kun la Internacia Instruista Kunlaboro per La Juna Vivo ankaŭ povis ricevi la konsenton de la anaro.

La filmservo ree faris dokumentan filmon kiel kutime kaj kun la firma konvinko esti sur la bona vojo ni forlasis Ipswich, kie ree ducent gejunuloj el ĉiuj partoj de Eŭropo kunvenis en granda harmonio.

La estraro reveninte hejmen eklaboradis por plenumi la decidojn de la kunveno. La Juna Vivo ekaperis por la aspirantaj anoj ĝis 14 jaroj 8 paĝa. La kunlaborado kun I.I.K. estis fakto.

Komence de 1948 s-ro Robertson, kies sanstato lasttempe estis tiom malbona, ke li nepre ne povis trovi la forton por daŭrigi la flegadon de la organizo, petis la estraron de T.J.O. senprokraste transpreni la tutan organizon en T.J.O. La tuta T.J.O.-aparato eklaboris por reorganizi la aferojn kaj momente tio jam estas fakto. La sekretariino de Den. Esp-istaro petis permeson por daŭrigi sian kutiman parton de la laboroj en kio ni kun ĝojo konsentis.

---

**L'espero, l'obstino kaj la pacienco**
**jen estas la signoj per kies potenco**
**ni paŝo post paŝo post longa laboro**
**atingos la celon en gloro.**

baldaŭ okazos. Origine ni intencis publikigi liston de partoprenontoj, tamen la Estraro opiniis pli necesa por konigi la historion de T.J.O. Je peto de ĉefe germanaj geamikoj ni ŝanĝis la nomon en Ry je T(utmonda) E(speranto) J(unular) O(rganizo).

Por la kongreso en l'Aquila sin anoncis ĝis la 15a de junio pli ol 150 partoprenontoj.

Ĝis revido en l'Aquila.

---

## KONGRESPROPONOJ DE LA ESTRARO.

La Estraro de TEJO proponas, ke la kongreso dum la jarkunveno akceptu:

1. plialtigon de la jarkotizo per almenaŭ 50 ned. cendoj po jare.
   Klarigo: La nuna abonprezo apenaŭ sufiĉas por la preskostoj. Por ne fari novajn ŝuldojn kaj por havigi al TEJO iom da mono por propagando, ni nepre bezonas ioman plialtigon de la kotizo.
2. La TEJO-anoj pagu sian jarkotizon dum, aŭ antaŭ la kongreso.
   Klarigo: La kasisto (kaj ni ĉiuj) nepre devas scii jam antaŭ la jarkunveno, pri kiom da mono li estontjare povas disponi. Nur tiamaniere ni povas certigi regulan kaj ĝustatempan aperadon de nia organo.
3. La perantoj kunportu siajn nomlistojn al la kongreso kun indiko kiu ano pagis sian kotizon, kiu ne.
   Klarigo: El multaj landoj venas plendoj, ke la perantoj ne transigis la pagitan kotizon. Por eviti similajn erarojn, ni povos estontece la protestantajn geamikojn tuj kontentigi per kontrolado de la respektivaj listoj.
4. Nur en kazo de neceso O.K.K. permesu **senpagan** restadon dum la kongreso. O.K.K. antaŭe kontaktu kun la Estraro de TEJO por pritrakti la problemon.
   Klarigo: Ni spertis, ke multaj tre kapablaj geamikoj, kiuj vere ĉiel meritas nian helpon, pro troa modesteco prefere restas hejme, ol kaŭzi al TEJO financajn malfacilaĵojn. Ni prijuĝu la helppeton laŭ la fakto, ĉu la petantoj iel klopodis disvastigi la ideojn de TEJO, do ĉu ili utilis iel al nia organizo. IJK ne estas filantropa instituto, aŭ somerrestadejo, kie ni senpagan feriadon povas certigi al kiu ajn hazarde Esperanton parolantaj personoj. Unue ni subtenu niajn proprajn perantojn, aŭ aliajn funkciulojn, kiuj pro financaj malfacilaĵoj ne povas partopreni en la kongreso.

---

## DUA INTERZONA RENKONTIĜO, DUM LA PASKOTAGOJ.

Pli ol 90 personoj sin anoncis por la 2a interzona renkontiĝo en Berlin, sed bedaŭrinde pro manko de dormloko povis partopreni nur 70. Unu el la amikoj venis el Odense, Danujo.

La renkontiĝo okazis en la junularestra lernejo en Rupenhorn, Char-

lottenburg, posedaĵo de la urba sindikato.

Jam ekde ĵaŭdo posttagmeze, dum la nokto kaj la sekvan tagon kelkaj berlinaj geamikoj deĵoris por akcepti neberlinajn partoprenantojn en stacidomoj fervojaj kaj aŭtobusaj. Helmut, la prezidanto de EJB zorgis pri tio, ke en la dormĉambroj estu enloĝigitaj ĉiam berlinanoj, orient- kaj okcidengermanujaj partoprenantoj, por intermiksi la societon.

La renkontiĝon oficiale malfermis Ewald Ebmeier (Bünde/Westfalen) montrante en sia parolo je la granda signifo de nia interzona renkontiĝo. S-ino Emmi Stox (Esp. Ligo-Berlin) bonvenigis la ĉeestantojn. Helmut Lehmann, prez. de EJB dankis ĉiujn, kiuj helpis realigi ĉi tiun vere malfacilan taskon: organizi interzonan renkontiĝon.

Salutoj venis el multaj landoj. Bondezirojn esprimis TEJO, la Intern. de la militrezistancoj el Anglujo, la Esperantistaro el la distrikto Dalerno en Svedujo, kiu en marto okazigis sian jarkunvenon kaj samtempe kolektis kelkajn subskribojn por saluti nin. El Nederlando salutis nin militrifuzanto, kartoj kaj leteroj venis de niaj geamikoj el Anglujo, Francujo, Jugoslavujo kaj multaj aliaj landoj, de geamikoj, kun kiuj ni konatiĝis dum niaj TEJO-kongresoj.

Dum la interzona renkontiĝo ni daŭrigis la pasintjaran diskuton pri gruplaboro kaj organizaj problemoj. Ni konstatis, ke la Germ. Esp. Junularo en la lasta jaro iomete kreskis kaj fondiĝis kelkaj novaj grupoj. La grupa vivo en la okcidenta zono estas treege pasiva, eĉ ne estas trovebla iu grupo, kiu estas preta transpreni la taskon de nova estraro. La malnova estraro devas rezigni pro profesiaj kaŭzoj. Restas kiel lasta savo de la organizo nur la berlina grupo, kiu impresas kiel la plej aktiva inter la tuta Esperanto-junularo. La berlina grupo fine ekkonis la neceson akcepti novan estraron almenaŭ dum unu jaro, kvankam la multaj berlinaj funkciuloj devas laboregi por plifirmigi sian berlinan organizon. (La ĝisnuna estraro troviĝas en Hersford/Westf.)

Ewald Ebmeier, la ĝisnuna prezidanto de GEJ, kiu ĉion ĉi tion prezentis al ni, raportis ankaŭ pri la pasintjaraj aranĝoj. Kiel la plej grandan kaj signifan aranĝon de GEJ li nomis la Interzonan Renkontiĝon.

En la orienta parto de Germanujo propagando de Esperanto estas malpermesata, tial orientulo opiniis, ke tie oni agu laŭ alia metodo, oni apliku nerektan manieron. Oni simple montru al siaj gekonatoj ekz. leterojn, gazetojn, revuojn ktp. el popol-demokratiaj landoj kaj nur menciu, ke korespondado estas eble en Esperanto.

Ĉe la komenco de la kongreso en la dormĉambroj kaj en la antaŭhalo estis dismetitaj flugfolioj kaj gazetoj, kiuj pritraktis la problemon de la remilitistarigo de Germanujo. Per ili ĉiuj havis la okazon sin prepari por la diskutado pri „aktualaj politikaj interzon-problemoj", kiu okazis posttagmeze. Alvenis grupo de eksterlandaj pedagogoj, kiuj hazarde konferencis en Berlino kaj nun volis rigardi junularorganizon en plena funkcio.

Post la paŭzo francaj pedagogoj intervjuis la orientulojn, dume en alia ĉambrego paroladis advokato - sro Kohl -, kiun ni tiucele venigis pri la leĝo: eblecô deteni sin de la militservo. La paroladon aŭskultis proksimume 20 personoj, ĉefe berlinanoj. Por diskuto ne plu sufiĉis

tempo, sed ni interkonsentis kun nia parolanto pri pli posta pritrakto de ĉi problemo en la berlinaj rondoj, eble en junio.

La Esperanto-balon ĉeestis pli ol 300 personoj. Dum la malfrua vespero ni prezentis diversajn distraĵojn.

La interzonan renkontiĝon ni finis per rondveturado tra ĉiuj distriktoj de Berlino. Nian specialan atenton havis la diversaj junularhejmoj k.s.

Per

**ĝis revido Paskon 1956**

ni adiaŭis fine.

Komp. laŭ raportoj de Hubert kaj Helmut.

---

## BANADO DE LA URSO.

### (Bulgara popola tradicio).

Balkano svingas sian hirtan mantelon. Orspikaj grenkampoj ornamas la deklivaĵojn, fiere sin etendas montetoj.

Sur herbejo kaj paŝtejoj kuretas ĉevalviro preter ĉevalaro, gregoj sin paŝtas trankvile.

Estas varme. En la rapide fluantaj riveretoj junedzinoj lavas tapiŝojn kaproharajn. Malpaciencaj paŝtistetoj kolektiĝas ĉe la bordo de la rivero. Ili tre ŝatus bani, sed ĝis kiam ne banis sin la urso, neniu kuraĝas eniri la akvon.

La infanoj babilas inter si:

Kie malfruas la urso-dresisto? Kial li ne venas? La viroj jam akrigas antaŭ la domoj siajn falĉilojn por rikolti la herbon. Sed la urso-dresisto ankoraŭ ne alvenas.

Iu kuraĝulo iras ĝis la rando de la rivero, sed ili certe scias, ke okazos akcidento al tiu, kiu antaŭ la urso eniras la akvon.

Sed ĉu la urso-dresisto venos entute? Pasko jam delonge pasis, la infanoj jam forgesis la kaŝitajn ruĝajn ovojn ...... la grenspikoj jam maturiĝas ......

Kaj tiam venas iu kun la sciigo: „Supre en Balkano oni banigas la urson!"

Gaje saltadas la infanoj, ili ja baldaŭ povos naĝi.

La virinoj havas tute aliajn zorgojn:

„Morgaŭ ni devos al la blankigejo."

Kaj la sekvan tagon ili portas la tolaĵon al la rivero. Larĝe ili sternas la malsekajn tolaĵojn sur la bordo de la rivereto, por ke la suno ĉion blankigu.

Ekblovetas la zefiro, tie kaj tie blekas la grego.

Subite ekkrias unu el la fraŭlinoj:

„La urson oni banigas en la profundejo!"

Rapide kolektas la fraŭlinoj la tolaĵon kaj kurante fuĝas hejmen.

La knaboj kaj knabinoj saltetas preter la rivero. Ili saltetas kaj gaje kantas:

„Ho urso, urso, ursego,
Ne estas lavita via dika felo,
Vi ĝin ellavas por vilaĝa festo,
Kaj ni ĝin sternos sur korto."

La urso subakviĝas kaj poste ĝi per sia antaŭa piedego gladas sian

buŝegon. En ĝia nazo estas ringo, al la ringo estas fiksita fera ĉeno.

Kun melankoliaj okuloj ĝi rigardas al la infanoj. Sed tiuj ne sentas la ĉagrenon de la urso, ili ĝojas pro la baldaŭa banado.

La ursodresisto trankvile sidas sur la riverbordo.


Tradukis Asp. N. Ivanov, por LJV adaptis Ebur.

## FOJE DIONIZO EKSEMIS PIZON.

Foje Dionizo eksemis pizon.
Kiam ĝin semis -
pro rido plenis.
Kiam rikoltis -
pro pen' senvortis.
Kiam ĝin draŝis -
ŝvitante paŝis.
Kiam kuiris -
pro brog' ekkriis.
Kiam ĝin manĝis -
ĝojis kaj frandis.

(El libro de Janina Porązinska esperantigis E. Korski).

## LA MALSANA KAĈJO.



La kaĉjo malsanis kaj kuŝis en lito.
Venis doktor-kato: „kiel apetito?"
„Malbone" kaj al li etendis la [kruron.
Doktoro je pulso prenis malsanulon
Kaj mire li diras:
„Vi manĝis tro multe
Kaj ne nur musojn, sed ŝinkon - ho, [stulte -
Kaj grason ...... malbone, vi febras [- sen spito,
Ho, longe, vi longe kuŝados en lito.
De nun vi manĝados nur farun- [supeton,
Neniam pro Dio lardon, aŭ kuketon."
„Kaj muson ĉu eblos?" de kaĉjo [murmuro,
Ĉu ne plu mi revu pri birda [femuro?
„Di'gardu! Hirudoj kaj diet' severa
Decidos pri l'sano kaj ĉio cetera."
Do kuŝis la kaĉjo. Nur iam el foro
Atingis lin grasa, kolbasa odoro.
Rigardu: malbono kun la puno paras,
Tromanĝis la kaĉjo, nun ĝi pento- [faras.
Kun vi infanoj povas esti same,
Do, antaŭ manĝegemo Di' vin gardu [tamen.

St. Jachowicz (Esperantigis: E. Korski).

**Nur rekte kuraĝe kaj ne flankiĝante**
**ni iru la vojon celitan.**
**Eĉ guto malgranda konstante frapante**
**traboras la monton granitan.**

**Dr Zamenhof**



## KORESPOND-ADRESOJ


*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Anglujo:** 23 j. f-ino Jacq. BEASLEY, 6, Richmond St. Plaistow, LONDON, E. 13. dez. kor. spec. kun Norvegujo, Svedujo, Danujo, Germanujo, Italujo.

**Nederlando:** Hendrik Veenstra, Voorstreek 37, LEEUWARDEN (17 j. knabo) dez. kor. ĉiuteme kun gejunuloj el la tuta mondo. Certa respondo.

---

## MARŜKANTO DE LA JUNULARO.




II

Ridantaj lipoj : beltrezor'
De vivoĝoj' sen lim';
En sana korpo, gaja kor',
Kaj suno en anim'.
Dum en libera danc-motiv'
Flirtadas la harar',
Ni man' en man', en kolektiv',
Kantante iras al la viv',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar'.

III

La ĝojo de ĉi nova tag',
La belo de l' natur',
Alvokas nin al la imag'
Al la brilega perspektiv'
De l' granda aventur',
De ni, la junular';
Ni man' en man', en kolektiv',
Kantante iras al la viv',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar',
Ni, junular',
Tra kampo kaj arbar'.

(Karel Candael)

F. V. DORNO.